

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO II<sup>a</sup> : MARTO 1922

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

---

Krom oficiala organo de la

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

ĝi estas vera

# LITERATURA REVUO

---

tute laŭfundamenta, organo de la

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

---

Sur ĝiaj paĝoj aperas la verkoj premiitaj en tiaj konkursoj kaj bonegaj tradukoj el la kataluna literaturo.

Jarabono : 5 pesetoj

Redakcio kaj Administracio :

CARME, 30 — BARCELONA



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

**Kataluna Esperantista Federacio**

Redakcio kaj Administracio:  
Carme, 30 : BARCELONA

Redaktoro : **Jaume Grau Casas**

## Adiaŭo

Al amiko Gili Norta, Prezidanto de K. E. F.,  
forveturonta al Ameriko

**B**EDAŬRINDE por nia esperanta movado, baldaŭ forlasos Barcelonon la de ĉiuj konata, entuziasma kaj laborema samideano S-ro Joan Gili Norta. Li entreprenos komercan vojaĝon al la Centra Ameriko, kiu tenos lin for de ni preskaŭ dum du jaroj.

Por dece adiaŭi lin, por montri ĉiajn bondezirojn al lia longa vojaĝo, ni vidigu kiom valora estis lia agado por Esperanto kaj por la Kataluna Esperantista Federacio, kaj estu tiuj ĉi vortoj publika kaj tute meritita esprimo de danko.

Kiam nia Federacio, konstruaĵo kies fundamentaj ŝtonoj estis disfalintaj, denove eksentis vivdeziron, mankis laboristoj kuraĝaj por la rekonstruo, mankis la homo, kiu, koninte la antaŭan strukturon, kapablus gvidi ĉiajn necesajn laborojn, ĝuste loki la

restarigatajn kolonojn kaj zorgi la stilan unuecon, por ke la rekonstruita domo estu tia sama hejmo por la katalunaj esperantistoj, kiun ili kreis kaj vivigis laŭ sia karaktero, laŭ siaj sentoj, laŭ sia kompreno de la esperantista idealo.

Kaj tiu bezonata homo estis samideano Gili Norta, elektita Prezidanto de K. E. F. je la komenco de la nova epoko de nia organizaĵo kaj reelektita dum nia lasta Kongreso. Ĉiuokaze li partoprenis la plej pezajn taskojn, li atentis la plej malgrandajn detalojn, li multobliĝis en ĉiujn direktojn, li oferis sian tutan tempon, energion kaj malavaran helpon se necese.

Li, malnova batalanto, klarigis kursojn, paroladis en propagandaj kunvenoj, ĉeestis lasttempe la Universalajn Kongresojn en Hago kaj Praha. Pro ĉio ĉi li vivis plej intense la esperantistan vivon kaj sentis plej arde la samideanan fervoron.

Tial li certe ankaŭ bedaŭros forlasi nin, ĉar en la landoj de li vizitotaj li ne plu povos sin senti en Esperantujo. Ke la tempo ĝis lia reveno forflugu tre rapide kaj tiam li retrovu la esperantan movadon, pli viglan kaj proksiman al la venko!

Por adiaŭi persone la altestimatan vojaĝonton, ni invitas ĉiujn Barcelonajn samideanojn esti en la haveno la 10<sup>an</sup> de Marto, je la tria posttagmeze, apud la transatlantika ŝipo «P. de Satrústegui». Ni atestu al li per tio nian samideanan dankon kaj amikan fervoron. Ke li forportu kaj daŭre sentu nian simpatian!





## Esperanto kaj la Ligo de Nacioj

**S**UB tiu ĉi sama titolo, en kataluna lingvo, ni raportis en la Januara numero pri la stato de Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj. Ni presigis eksterordinaran nombron da ekzempleroj de tiu numero kaj dissendis ilin al ĉiuj bibliotekoj, ĵurnaloj kaj kulturaj societoj en nia lando, farante per tio bonan propagandon.

Oportune estis plenumata la decido de la IX<sup>a</sup> Kataluna Kongreso : 1<sup>e</sup>) Gratuli la delegitojn de la 13 ŝtatoj subskribintaj la peton faritan pri Esperanto al la Ligo de Nacioj; 2<sup>e</sup>) Sciigi al la Ĝenerala Sekretario de la Ligo ke K. E. F. volonte havigos al li ĉiujn detalojn pri la stato de la esperantista movado en Katalunujo; 3<sup>e</sup>) Danki al la ĝenerala vicsekretario de la Ligo, S-ro Nitobé, la intereson pri Esperanto de li elpruvitan en Praha.

Responde al la respektivaj komunikaĵoj, nia Sekretario S-ro Guardiet ricevis leterojn de Lord Robert Cecil, delegito de Sud-Afriko, kaj de la Persa delegito, Emir Zoka-ed-Dowleh, dankantajn la ricevitaĵajn gratulojn kaj promesantajn plenan helpon al Esperanto; ankaŭ estas ricevita afabla respondo de S-ro Nitobé, kaj oficiala letero de la Ligo petante la raporton pri nia movado, ĉefe pri la instruado de nia lingvo en lernejoj.

La D. K. de «Kataluna Esperantista Federacio» jam estas sendinta al la Sekretario de la Ligo de Nacioj plenan respondon al la ricevita demandaro. Bedaŭrinde en nia lando malmulto estas farita rilate la instruadon en lernejoj; sed nia respondo vidigas la fortan edukon valoron de Esperanto, speciale spertitan ĉe ni, kie preskaŭ ĉiuj esperantistoj apartenas al humilaj klasoj.

Fine, ni ricevis ĝentilan leteron de la Ministro de Publika Instruado, S-ro César Silió, kun la sciigo ke ni devas fari rekte al la ŝtata Ministro la peton ke la hispana registaro apogu en la proksima kunveno de la Ligo de Nacioj la proponon por enkonduko de Esperanto en la publikaj lernejoj.

## Fabelo Serena

Bela kiel Apollo : lia vesto, mallonga kaj ligita al la trunko, kiun almuldis la Genioj; nudaj, la fortaj brakoj, kaj la kruroj ankaŭ; kiel eburkolono, lia kolo; kapo alta, severa kaj majesta; okuloj helaj, kiel brulaŝtipo, — Endimiono supreniras monton Latmo. Sagon la bronza pugno tenas, vundontan la cervidojn flugrapidajn, kaj antaŭ li la paciencaj ŝafoj manĝas la herbon de l' paŝtejo suka.

Estas la milda sunsubira horo... Febo, la Dio de hararo ruĝa, de longe jam trairis la zeniton, per sia ĉaro radosulkojn vastajn kaj purpurajn farante, orohelon semante sur la pintojn de la arboj... Estas kvietaj horoj, por ĉaĝgrendoj konfidencia, estas milda horo de l' bruetoj malgajaj kaj sopiraj, kiam kolomboj de Venuso kveras en la bruna soleco de la temploj.

Endimiono, la paŝtisto bela, paŝas sur monto supren al la altaj pintoj, ĉerpantaj la helecon lastan de l' brulado sidera. Kaj malsupre, sur la ebenaĵoj, en la plej trankvila volupto, grenoj blondas atendante la falĉohoron; mirtarbaroj jetas aeren ĉirkaŭ ili bonodorojn. La gejunuloj, spiregante ĝue kaj lumbriaj, sur montflankoj restas, kie brueto de la kisoj sonas ĉe foliaro, kiel akv-murmuro.

Endimiono, la rapidkrurulo, laca sidiĝas; liaj brakoj falas laŭlonge de la trunko, kiel velo de triremo (\*) senmova; harofrizoj sur frunto lia mirvalon faras.

Kaj rigardante horizonton, kiu antaŭ li sin malfermas, kiel floro brulanta, je Destinoj primeditas la bela knabo. Pensas li, ke Dioj regantaj tutan mondon, lin forjetis sur brunan teron, kiel ŝtonon, kiu en fluo kota de la vivo iras rulate de l' hazardo. Li sin trovas laca; ĉio de li vidata kaŭzas al li enuon, kaj nenio ĝojon; ĉar lin la febro de freneza emo senĉese rodas, kiun ne nuligas odora vino en pokalo vasta, nek plaĉa amo de fraŭlino juna, nek la humilaj mildeblekaj ŝafoj, nek sago traboranta la aeron, nek mem la vivo, kiu al li pezas... Pli fortan, ol la vino, li bezonas ion, povantan elestingi ĉiam ardan soifon, kiu lin bruligas; ion pli dolĉan, ol virina amo; ion pli belan, ol la blankaj ŝafoj; ion kuraĝan, pli ol fluga sago; ion pli grandan, ol la homa vivo.

Kaj Zeŭso diras :  
— Laŭ deziro, petu ! —

La koro de l' paŝtisto, ĝojebria, batas en brusto, kiel juna birdo provan-

---

(\*) Pratempa ŝipo kun tri vicoj de remiloj.

ta flugi, je flugado virga, por alteniri trapasante nubojn. Fierigita de malhumileco, levas la kapon ornamitan ore de haroringoj, kaj okulojn turnas, kaj antaŭen hardite rigardante, tiel respondas li al la Sinjoro :

— Homojn gefratojn mi malgrandaj trovas pro iliaj instinktoj kaj pasioj, kaj superi mi volas ilin ĉiujn... Senmorta esti tra l' jarcenta polvo ! —

Zeŭso meditas kaj respondas :

— Estul —

Dolĉa, serena kaj solena, kiel la edziniĝo de virg' ino ĉasta, la nokto venas... Mallaŭtiĝas voĉoj kaj flugas la Zefiroj en mistero kvazaŭ de revo. Sur la maraj rokoj, diafanaj Sirenoj alkuŝiĝas sur la muskajn kusenojn, kaj vesperto, la birdo de malcerta flugo, tien kaj aliloken mirigite glitas sen ia bruo, en malhela vesto...

Malsupren iras sur Forgeso-monto Endimiono, la olimpa; paŝas embasasita de dormemo forta pro kiu lace la palpebrojn fermas.

Ne malproksime li rekonas lokon, kie kuŝadi ĝis Aŭroro brilos; ĝi estas kavoj, kies buŝon kovras hederoj kaj likenoj, plektiĝante kvazaŭ en milda, ĉe mallaŭto, sveno, — en kies fundo sur ŝtonrando lumas du okuloj otusaj, fosforeskaj.

Endimiono la arbustojn ŝovas, kiuj vekigigas kun murmuro mola, du paŝojn faras en malsekan ombron, kiu lin kovras per malvarmo prujna, kaj demetas surteren la sagujon por ripozo kusenon de la kapo.

Ĵus kuŝiĝinta, tuj al li palpebroj fermiĝas; post sopiro de feliĉo restas dormanta, kiel suĉinfano en vartaj brakoj de la nutristino. Eĉ al li ŝajnas sur la freŝa vango senti elspiron delikate varman de virino; kaj tamen ne virino, sed Vulpo ruza estas, kio venas al la kuŝinto, ĉirkaŭrigardante lin per okuloj pro surprizo granda palpebrumantaj. Tuj, vekante Eĥojn, eliĝas bleko el profundo kava, kaj aliras, trenante voston, Lupo flaranta suspekteme la mallumon. Ĝiaj okuloj malkvietaj ĵetas rapidzigzagojn de verdeco hela, ĝis kiam Vulpon ekvidinte, ili jen pro timo fiksiga, jen minace. Kaj ĵus ĝi faris, kiam baraktado de flugilegoj la aeron batas kaj kun dismovo de freŝeco, Korvo, el la spaco, malluma alteriĝas; kaj sur roko Serpento verda rampas ambaŭflanken svingante sian kapon.

Ĉirkaŭe la dormanton la kvar bestoj sin metas diligente kaj tre ĝojaj je la festeno, kiun la mallumo rezervas bonvolema nur por ili... Kaj elektas antaŭe ĉiu sian akirotajon laŭ la gusta ŝato.

Manĝema Lupo, la malklarrigarda, la internaĵojn volas mordi akre kaj ilin preni je fumantaj pecoj. Vulpo la ruza plej la kapon ŝatas por formangi la cerbon rapidurĝe, varman ankoraŭ de l' idea ago, je intelekto homa mastriĝante. Korvo pensas alie : same estas al ĝi nenio aŭ la intelekto; ĉar ĝi revas enigi la ungegojn retorditajn en bruston karnodensan, kaj bekfrapante, ĝin disŝiri, ĉifi, ĝis kiam trovos sub la kurbaj traboj, la ripoj, ruĝan fonton de la vivo. Al si hardita la Serpento diris, ke lanco sia, ĝi angion vun-

dos kaj ĝi trinkos la sangon estingontan ĝian prujnan malvarmon, — forti-  
gontan por rektigi la korpon, kiel Homo.

Kaj kviete Endimiono dormas, kiel Di-elektito; sur la tero li havas sian  
korpon : malproksime, sur la Olimpo, sian fantazion; sed por li jen la horo!  
Lupo blekas kun volupta spirado; Vulpo venas per lango dorlotante sian  
faŭkon; Korvo streĉas la kolon kaj ekkrias kaj Serpento rektiĝas sur la vos-  
to... Kaj dume iras tra la densa ombro persista, vibra siblo de Otuso...

Pleniĝas spaco per heleco... Nubo mirinda tereniris; ĝiameze, reĝo de  
Dioj, tero kaj aero, Zeŭso eliĝis kaj antaŭeniras rekte al kavo, kien li eni-  
ĝas. Lupo kaj Korvo posten kuras, blindaj, kaj en ombron rapidas Vulpo ku-  
ŝi, dum la Dio, fulmante per rigardo, Serponton prenas kaj vipadas ilin, tre-  
migante la kavon per parolo :

— Malperfektaj estaĵoj, fiaj monstroj de malbonaj instinktoj, kunularo  
de inklinoj malplaĉaj, malŝatindaj!... Indiferentaj bestoj je la Belo — apana-  
ĝo de Dioj, — envidemaj je intelekto kaj je vivo pura, for de la sankta homa  
ripozejo! Vian senpovan muksalivon verŝu sur teron, kiun suverene paŝos  
plandoj de Homo; sed haladzo spira de viaj buŝoj, for de lia kapo, elektita  
por templo de la revoj... —

Kaj dum Zeŭso parolis, tuta tero spiron haltigis... kiam li silentas, Lu-  
po time kaŭriĝas kaj la Vulpo sin ŝovas tra l' mallumo, silenteme, kaj Kor-  
vo sub flugilojn kapon metas... Serponton Zeŭso ĵetas, kiu falas sur teron  
kun *traf*-sono de molaĵo kaj senmove restadas tie; dume en la profundo, sur  
ŝtonrando, siajn okulojn lumajn fermas kaj malfermas Otuso, fikse rigar-  
dante Dion, kies ordonojn ĝi atendas.

Tiel al ĝi parolas Dio :

— Kamarado de paco kaj sekreto! Garde staru apude elektiton, envol-  
vitan de mistero, ke vi komprenas bone kaj obeas respekte mian volon! —  
Kaj Zeŭso realtiĝas en la nubon, kovrante per parfumoj homan mondon...

Infinito fendigās : brilas Luno...

Kaj honteme la ŝteloj tremebrilas... kaj la spaco skuiĝas kaj ekĝemas...  
kaj la fonto mallaŭte murmuretas... sub foliario proksimiĝas birdoj... leono  
ĉe dezerto raŭke blekas... sur verdaj lagoj akvfeinoj naĝas onde trenante la  
hararon blondan... kaj plejbela kaj pala jonkvilfloro la tigon streĉas en odo-  
ra sveno...

Kaj tutan teron iluminas Luno...

La kavo suĉas diligente ombrojn; likenoj kaj hederoj malplektiĝas kun  
ĝoja skuo, invitante Lunon inter ilin... Kaj Luno tuj eniras...



Estas la bela knabo sur la tero, kuŝa statuo el marmoro roza... Sur la tempioj, — flokoj de orharoj, kaj la vizaĝo, — kiel masko vaksa...

Luno lin vidas : per rigardo pala haltas lin mirefikse rigardadi, dum spasma daŭra ĝin subite skuas... De post la tempo, kiam mondo estas, ĝi ne memoras de mortulo saman miraklon, nek plii grandan superbeldon, nek mirindaĵon tian... Kaj venkita de la sorĉaĵo, kiu ĝin potencas, dormanton volas ĝui, dum li dormas.

Endimiono ĉe l' unua kiso tremante sentas, ke mistero vibras en interno de li; la vasta spaco de la sonĝo mistera tutpleniĝas per heleco lin forte blindiganta... Ebria de feliĉo ne sentita, ĝis profundo de l' esto atinganta, li dolĉe sin fordonas al Lunhelo, sentante, ke li ĉiam estos ĝia.

La Mondo antaŭsentis la magian edzofeston, kaj mire ĝi silentas kaj aŭskultas avide; la Diinoj en Olimpo forgesas dum momento pri la Dioj eternaj kaj ekpensas pri malproksimaj homoj... dum Otuso sur ŝtonrando, sensanĝe gardstarante, malfermas kaj refermas la okulojn, lumantajn en la ombro kiel lampoj edzfestaj kaj per siblo tonpersista kantas senfinan himeneau kanton...

Forkuras la Zefiroj; la Sirenoj, ridante, sur la rifojn de koralo kunrifuĝas, timemaj je la lumo; kaj unu post alia disfandiĝas la palaj steloj en etero blua...

Arbo, skuante sian verdhararon, la birdojn ĵetas al la ventoblovo, tintas la fontoj kun sonoro ĝoja, la floroj kaj folioj gutas roson, el fundo de l' ĉielo tero iĝas kaj en la spaco grakas akre Aglo...

Ekhelas la Aŭroro sur la tero!...

Edzofestaj lampetoj estingiĝas, hedero la malsekan foliaron apogas dorme al lulilo ŝtona, kaj, disĵetitaj, sub la suno blankas ostoj sur muske tapiŝita tero.

Kiam heleco tra palpebroj liaj Endimionon vekis, li sopiras, kaj sentante plezuron en la sino, kaj feliĉan, mirigan korpotremon, li kredas, ke ankoraŭ revo daŭras... Sed kun nova fortiko li stariĝas tute hardita kaj sentante fajron, kiu hartas al li animon lian. Kaj tiam, kortuŝita de l' miraklo, demandas Diojn, kio li fariĝis...

Zeŭso respondas lin :

— Saluton! Homo al amo senmakula fordonita, al la amo je lumo, heroigal... Senmorta estu tra l' jarcenta polvo! —

Katalune verkis VICTOR CATALÀ

Tradukis JOSEP GRAU CASAS

Honora mencio en la Literatura Konkurso de la XI<sup>a</sup> Kongreso, S. Francisko de California.

## Kaj tiras la ĉaron mizera Anam' \*

Ho, lando mistika, tropika terpeco.  
 Saluton akceptu, saluton de l' kor' !  
 Vin pompe ornamis per ĉiu beleco  
 patrina prizorgo de la ekvator'.  
 La songoj infanaj, fabelo de l' avo  
 por mi plu ne estos mistera rebus',  
 ĉar, jen, realiĝis en vero kaj ravo,  
 pri kio mi revis sub norda polus'.  
 Jen palmoj borderas zigzage la bordojn,  
 en nestoj ekstrilas birdkanto kun ĝoj'  
 kaj portas la vento muzikajn akordojn  
 el pajla kabano staranta ĉe l' voj' ...

Sed kial min kaptis subita korpremo?  
 Pro kio en larvoj sin dronas la flam' ?  
 Terure! Nur nun mi rimarkis pro ĝemo,  
 ke tiras la ĉaron mizera anam' ...!

Ŝvitante spirblove la ĉaron li trenas  
 en kiu sidante meditas mi nun.  
 Vidante ĉi homon, pro honto, mi tremas,  
 bruligas ĝi pli min ol fajro de l' sun'.  
 Ho, kial ne estas mi riĉa, potenca,  
 por doni homvivon al sklava homfrat' ?  
 Ho, kial instigas min volo intenca  
 se forton posedi ne povas kompat' ?  
 Kaj kial sekrete nun voĉo en koro  
 ribele blasfemas pro tera destin',  
 ke kelkaj satiĝas per ĝuo kaj oro,  
 dum miloj nur havas turmentojn sen fin' !

Pro milo da kaŭzoj fariĝas martiroj,  
 pereas ideoj, pereas homam' ;  
 la celoj majestaj nur restas — sopiroj,  
 kaj tiras la ĉaron mizera anam' ...!

JULIO BAGHY

Premiita en la VIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj.

\* Anamo = ĥina raso, loĝanta en Indio-Ĉinio.

**En memorlibron de knabino**

Kvieta, dolĉa estu via viv'  
Kaj gaja, kiel ludo de infanoj  
Dancantaj vigle, manoj en la manoj  
Je maj-maten' sur suna montdekliv'.

Se venas ankaŭ iom da dolor'  
Ĝi estu, kiel siluet' de mano,  
Se ombroludon ludas la infano :  
Facila, farsa, flirtu baldaŭ for.

Deziroj, kiel ŝafidetoj, ĉie  
Vagadu vigle, pro l' odor' ebrie  
Sur verdaj kampoj inter flornamo,

Ĝis fine ilin kun vipanta pelo  
Direktos al la ununura celo  
Paŝtist' sovaĝa : la unua amo.

**Am' ne estas ...**

Ho, am' ne estas ludo,  
Sed forta sorta trudo.  
Ĝi svingas sian vipon  
Al lip' pelante lipon.

Ni timas ĝian baton,  
Kapricon, senkompaton,  
Sub ĝia jug' ni svenas ...  
Kaj tamen ĝin ni benas.

K. DE KALOCSAY

## Lingvaj Demandoj kaj Lingvosciencia Metodo



TIU ajn scienco povas atingi sian propran celon nur, se ĝi uzas konvenan propran metodon, kiu taŭgas por la esplorota objekto. Same, kiel ĉiu alia scienco, la lingvistiko devas uzi, esplorante la lingvajn demandojn, la konvenan propran lingvosciencan metodon.

Tiun ĉi tute simplan kaj evidentan principon bedaŭrinde ofte forgesis kaj ankoraŭ forgesas multaj Esperantistoj, kiuj konstante aplikas al la solvo de lingvaj demandoj ian tute fremdan kaj netaŭgan metodon. La matematikistoj certe mokridus ĉiun malsaĝulon, kiu pretendus solvi matematikajn problemojn per biologia aŭ psikologia aŭ historia metodo. Strange estas, ke oni ne miras, vidante matematikistojn aŭ matematikemulojn diskuti pri lingvaj demandoj laŭ tute maltaŭga kaj kontraŭcela metodo, ĉar lingvo ne estas matematikaĵo.

S-roj Couturat kaj de Saussure, estante ambaŭ matematikistoj, iniciatis la eraran aplikon de la matematika metodo al la esplorado pri nia lingvo, kaj poste, kelkaj estimindaj Esperantistoj, erarigitaj de la ekzemplo liverita de homoj, kies altvaloro kaj merito estas nediskutebla, ĉiumonate publikas en niaj gazetoj prilingvajn artikolojn, kiuj povus esti ĝustaj kaj trafaj, se ili koncernus eksklude la teknikan lingvon, sed kiuj estas tute maltrafaj kaj eraraj, se oni pretendas, ke ili koncernas la komunan lingvon.

Al tiaj tro matematikemaj lingvistoj la ĵus publikita, majstra libro de Prof. Aymonier pri la „Derivado en naturaj kaj en artaj lingvoj („Essai sur la dérivation comparée dans les langues naturelles et artificielles) prave montras la sekvidan vojon kaj la uzindan metodon. Tiu ĉi pure scienca kaj objektiva libreto, verkita de vera kaj klera lingvisto, konkludas post plena pruvado, ke ne nur la vortkunmetado sed ankaŭ la derivado obeas samajn principojn kaj regulojn en Esperanto kaj en la naturaj lingvoj. „Esperanto sekvante procedojn, kiuj estas kutimaj al la homa spirito, celas la ŝparadon de la peno kaj la atingon de klareco per plej eble malmultaj rimedoj kaj materialoj, ne starigante apartajn arbitrajn regulojn... Tiel ĝi efektivigis la maksimumon da natureco akordigebla kun la maksimumo da logikeco, kaj ĝi trafis plej grandan facilecon kune kun plej granda klareco“.

Esperanto diferencas je la naturaj lingvoj nur per sia pli granda reguleco kaj simpleco, sed Prof. Aymonier pruvas per konvinkaj ekzemploj, ke ankaŭ la naturaj lingvoj pli kaj pli emas al reguleco kaj simpleco kaj iom post iom alproksimiĝas al tiuj kvalitoj.

Niaj matematikemaj nunaj lingvistoj, tute same, kiel la Idistoj, rigardas la vorterojn kiel nombrojn aŭ ciferojn, kiuj havas fiksan kaj senŝanĝan



valoron; ili diskutas pri la senco de la kunmetitaj aŭ de la derivitaj vortoj konsiderante ilin kiel matematikan ekvacion.

Kontraŭe Prof. Aymonier atentigas, ke „en la naturaj lingvoj neniu kunmetita nek derivita vorto estas plenesprima kaj eksplicita; ke estas plio en ia vorto ol en la sumigo de ĝiaj eroj; ke elipso (forlaso de vortero) regas ne nur la vortkunmetadon sed ankaŭ la derivadon“. La samon oni konstatas en Esperanto : en nia artefarita lingvo tute same, kiel en la naturaj lingvoj, ĉia vortklasa finaĵo, ĉia afikso povas „montri tre diferencajn rilatojn, kiuj restas neesprimitaj, ĉar la spirito plenigas la mankon“. La ĝustan signifon precizigas ne nur la kunteksto, sed ankaŭ precipe la naturaj efektivaj rilatoj de la ideo esprimata de la radiko kaj la bezonoj aŭ oportunaĵoj de la praktiko.

Estus tre dezirinde, ke ĉiuj Esperantistoj, kiuj interesas sin pri lingvaj demandoj kaj volonte pridiskutas ilin, atente tralegu la majstran verkon de Prof. Aymonier kaj plene profitu ĝin. Tio evitigus al ili tro oftajn diskutojn kaj tro akrajn kritikojn, kiuj estas bazitaj sur principa *idista* eraro. Ekzemple ili ne kritikus la vorton *korekti*, dirante, ke ĝi estas neĝusta kaj malbona, kaj ke oni devas anstataŭigi ĝin per la vorto *korektigi*, ĉar la finaĵo -i kun adjektivo egalvaloras *nur* „esti“, sekve la vorto *korekti* signifas *esti korekta*, sed ne povas signifi *igi korekta*. Tia matematika rezono estas maltrafa : la finaĵo -i egalvaloras nek „esti“ nek „fari“ nek iun alian vorton; la U. V. simple instruas, ke -i montras la verbon. Do se oni aldonas la finaĵon -i al adjektiva aŭ substantiva radiko, oni ne povas trovi la signifon de la ricevita verbo per simpla adicio; la ĝustan rilaton inter la radiko kaj la derivita verbo difinas kaj precizigas nur la naturo de la ideo kaj la bezonoj de la praktiko. Nu, ĉar en la praktiko oni neniel aŭ treege malofte bezonas unuvortan verbon por signifi „esti korekta“, dum kontraŭe oni ofte bezonas verbon signifantan „igi korekta“, la verbo rekte derivita de la radiko nature ricevas tiun ĉi plej oftan kaj plej bezonatan signifon. La samo estas pri *fiksa* kaj *fiksi*, *abstrakta* kaj *abstrakti*, *buko* kaj *buki*, *konfuza* kaj *konfuzi*, *korko* kaj *korki*, *loko* kaj *loki*, *regulo* kaj *reguli* k. t. p.

Alia formo de la matematika kaj *Idista* maltrafa rezonmaniero estas la konfuzo inter la komuna kaj la teknika lingvo, aŭ, pli ĝuste, inter la bezonoj de la komuna kaj tiuj de la teknika lingvo. Certo estas, ke oni ne povas difini fiksaĵajn limojn inter ambaŭ, tute same, kiel oni ne povas precize distingi kaj difini, kie finiĝas la blondeco kaj komenciĝas la bruneco. Tamen certo estas, ke ekzistas vere kaj pure brunaj haroj, sed la mezkoloraj estas nedistingeblaj. Tiamaniere oni ofte ne povas decidi, ĉu iu vorto apartenas al komuna aŭ al faka lingvo, ĉar tio dependas de la stato kaj disvastiĝo de la sciencaj konoj, kaj de la inteligento kaj klereco de tiu, kiu uzas la lingvon. La grado de vortoj *telefono* kaj *aeroplano* iam certe apartenis al la teknika lingvo; kiu tamen kuraĝus hodiaŭ aserti, ke ili ne estas komunlingvaj?

La vera diferenco inter la teknika kaj la komuna lingvo ne kuŝas en la vortoj, kiujn ili uzas; ĝi kuŝas en la malsameco de iliaj bezonoj kaj praktikaj

postuloj. Tute prave diras Prof. Aymonier : „Neniu dubas, ke la scienca kaj teknika lingvo, en kiu la precizeco neniam povas esti tro granda, postulas pli multajn sufiksojn ol la komuna lingvo, pli severan uzadon de tiuj sufiksoj, pli rigidajn kaj pli mallargajn regulojn pri la vorkonstruo“. La faka lingvo nepre bezonas absolutan prezicecon, logikecon, unuformecon kaj reflekseblecon. Ekzemple ĝi estas tute prava precizigante kaj plimallargigante la signifon de la sendifina sufikso *um*; sed tia plimallargigo kaj precizigo estas nepre malprava, kontraŭfundamenta, danĝera kaj malpermesata, se oni pretendas, kiel faras nun kelkaj Esperantistoj, trudi ĝin al la komuna lingvo.

Ni ne imitu la Idistojn, kiuj erare konfuzas la bezonojn kaj postulojn de la scienca lingvo kun tiuj de la komuna lingvo. Koncerne la efektivajn bezonojn de la komuna lingvo, ni neniam forgesu la saĝajn kaj profundajn konsilojn de Zamenhof : „Lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo sen viva kaj tro peza... Ni ne devas peni, ke nia lingvo estu tro preciza, ĉar tiam ni nin mem katenus... Tro granda severeco kaj katenado estas superflua. En tiaj okazoj, kie kelka libereco alportas al ni nenian malutilon, kial ni devus senbezone nin malliberigi?... Ju malpli ni okupos niajn kapojn per diversaj „plibonigoj“ kaj ju pli ni simple propagandos kaj riĉigos la lingvon, des pli bone estos“.

E. GROSJEAN-MAUPIN

(El *Esperanto Triumfonta*)



## Bibliografio

ŜAKLUDADO. — Traduko de la komedio «Una partita a scacchi» de la fama itala verkisto Giacosa. Esperantigis verse Fratoj P. kaj R. Padulli. Kolekto de la Revuo «L'Esperanto» eldonata de A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italujo) 1921. Prezo : 3 liroj.

Bela broŝuro 48-paĝa. Tre plaĉa komedieto unuakta kun malgranda prologo. Olivero, grafo de Fombrono, alvenas kun sia paĝio Fernando en la kastelon de Renato. Olivero rakontas ke pro la kuraĝo de Fernando ili povis rezisti dum la vojiro atakon de la rabistoj. Renato, ĝenata de la fiera

paĝio kiu fanfarone asertas venki en ĉiaj bataloj, promesas al li sian belan kaj lertan filinon Jolando se li venkos ŝin en ŝakludado. Kun forta miro la patro de Jolando observas ke ŝi lasas sin venki de la gracia paĝio, kaj li bedaŭras la faritan promeson. Post la ŝakludado la paĝio Fernando estas ankaŭ venkinta en ama ludo. «Kial vi turnas ĉiam mute rigardojn helajn?» — «Mi? Mi rigardas viajn okulojn tute belajn...»

Bedaŭrinde, en tiu versa traduko estas tro da sufiksaj rimoj. Ĝi enhavas tamen multe da belajoj, kiuj igas la komedieton tute prezentinda en niaj teatraj festoj.

TRA LA MONDO. — Internacia legolibro kolektita kaj prilaborita de Paul Bennemann. Unua parto: Por komencantoj. Kun multaj bildoj kaj muziknotoj. Eldonis: Ferdinand Hirt & Sohn, Salomonstrasse, 15, Leipzig. Prezo: 15 markoj.

Bonege prezentita libro kun 96 paĝoj kaj fortaj kovriroj. Ĝi enhavas Antaŭparolon kaj 6 ĉapitrojn: Proverboj, Aforismoj, Interesajoj el la vivo kaj sciencoj, Fabeloj, fabeloj kaj rakontoj, Sercaĵoj, Por liberaj horoj. La tuta teksto estas tre interesa kaj bonstila. Nur kelkajn novajn formojn ni ne ŝatas.

L' ESPERANTO ET LES ASSOCIATIONS INTERNATIONALES AU CONGRES MONDIAL DE BRUXELLES - 1920. — Eldonis: Centra Oficejo Esperantista, 51, rue de Clichy, Paris. Prezo: 2 frankoj.

Propaganda broŝuro enhavanta la preparajn cirkulerojn de la Kongreso de Internaciaj Asocioj (Bruxelles, 5-20 Septembro 1920) kaj plenan raporton pri la ĝenerala kunveno, en kiu oni decidis rekomendi al ĉiuj partianoj de lingvo internacia la aliĝon al la esperanta movado. Teksto tute leginda.

KURSA LERNOLIBRO laŭ praktika parola metodo, de D-ro Edmond Privat. Eldonis: Esperanto-Verlag, Berlin S. 59. 1922. Prezo: 13'50 markoj.

Kvara eldono de la bona lernolibro, tre taŭga por esti uzata en kursoj kaj speciale celanta paroligi la lernantojn. Jam estas eldonitaj 17 miloj da ekzempleroj.

MONDO KAJ KORO. — Poemoj de K. de Kalocsay. Budapest, 1921.

Kolekto de 29 bonaj versaĵoj, grupigitaj en du fakoj: «Nova Sento» kaj «Mondo kaj Koro». El la unuaj, estas distinginda tiu «Je la naskiĝtago de Zamenhof post la mondmilito». En la dua parto troviĝas tre belaj poemoj, inter ili kelkaj sonetoj. La hungara samideano Kalocsay montriĝas per tiu verketo kiel unu el la plej bonaj esperantaj poetoj. Por konigi al niaj legantoj lian inspiron kaj facilan rimadon, ni aliloke represas du el la poemoj.

J. G. C.

## Propaganda Kunveno en Manresa

### Inaŭguro de la Grupo "Bela Espero"



GRAVA sukceso ni devas konsideri la propagandan kunvenon okazintan la 19. de Februaro kiel inaŭguro de la grupo «Bela Espero» en Manresa, urbo elektita por la venonta X<sup>a</sup> Kongreso de Katalunaj Esperantistoj.

Matene alveturis la urbon pli ol 40 samideanoj el Terrassa, Ripollet kaj Barcelona. Ilin akceptis ĉe la stacidomo la lokaj esperantistoj. Oni vizitis la Katedralon, la «Cova de Sant Ignasi», la Urbdomon, la faman bazaron Jorba, kaj aliajn vidindaĵojn. En la Urbdomo oni iris saluti la Urbestron, kiu afable akceptis la esperantistojn kaj promesis la helpon de la Urbkonsilantaro. Ankaŭ S-ro Jorba, la konata komercisto, estis salutata de la samideanoj dum ilia vizito al lia bazaro kaj diris kuraĝigajn vortojn por nia movado.

Tagmeze, por festi la inaŭguron de la Grupo, la samideanoj kuniĝis en komuna tagmanĝo ĉe Hotel de S. Domingo. Ĝenerala optimismo regis pri la progreso de nia ideo en la urbo kaj pri la sukceso de la venonta kongreso. Parolis esprimante bondezirojn al la nova esperanta societo ĝia Prezidanto S-ro Albagés; S-ro Pujadas, nome de la Manresaj ĵurnalistoj; la entuziasma samideano Chaler el Terrassa, kiu venis kun kvar knaboj lernantoj ĉe lia esperanta kurso; la redaktoro de «Kataluna Esperantisto»; Pastro Planas, el Ripollet, kiu benis tiun manĝotablon frate kunigantan tiel belan nombron da fervoraj batalantoj; kaj samideano Gilí Norta, Prezidanto de K. E. F., kiu profitis la okazon por adiaŭi per kortuŝaj vortoj la katalunan esperantistaron, antaŭ ol forveturi al Ameriko. Fine oni faris fotografaĵon kiu rememorigos pri la agrabla festeno.

Posttagmeze, je la kvara, okazis ĉe «Centre Autonomista de Dependents», sidejo de «Bela Espero», la propaganda mitingo. Ĝi estis anoncita speciale per belaj invitiloj kaj malgrandaj afiŝoj en la montrejoj de la butikoj.



Prezidis S-ro Suaña, Urbkonsilanto. Ĉeestis multenombra publiko, kiu tre atente aŭskultis la parolantojn kaj ilin aplaudis tre varme, montrante sian konvinkon pri la bonoj de la internacia lingvo.

Komencis paroladi S-ro Albagés, eminenta instruisto kaj tre konata kaj influa ĉe intelektaj rondoj en Manresa, raportante pri la naskiĝo de la Grupo kaj ĝia estonta disvolviĝo, pri la tasko akceptita organizi la X<sup>an</sup> el niaj brilaj Kongresoj, kaj ĝojante tial ke fine estos ankaŭ en Manresa grava esperantista societo, kio pruvos unu fojon ankoraŭ la kulturen progresemon de la urbo.

S-ro Gili Norta paroladis pri la ĉarmo de niaj universalaj kongresoj, plena komprenebleco de nia lingvo kaj interfrata helpemo de la esperantistoj.

S-ro Oliart glosis la valoron de Esperantismo rilate la pacigon de la nacioj kaj la internan homan unuecon.

S-ro Grau faris belan laŭdon de Esperanto, kiel lingvo literatura kaj plene taŭga por la plej altaj aferoj de la spirito.

S-ro Solà klarigis la «artefaritecon» de nia lingvo kaj elokvente parolis pri ĝiaj jam nunaj servoj kaj ebleco de pli grandaj en la estonteco.

Pastro Planas konsideris Esperanton kiel unu el la plej noblaj celoj, vere fratiga kaj akceptinda de ĉiuj homoj de bona volo.

Fine la Urbkonsilanto S-ro Suaña esprimis la deziron ke Esperanto baldaŭ sukcesu kaj salutis la eksterurbajn esperantistojn nome de la Manresanoj.

Je la eliro de la ĉeestantoj, oni disdonis 500 katalunajn ŝlosilojn. Diversaj ĵurnaloj aperigis raportojn pri la propaganda kunveno kaj inaŭgura festo de la nova Grupo. Anoncis sin multaj gelernantoj.

Ni gratulu la fondintojn de «Bela Espero» ĉar bela espero estas efektive ĝia fondiĝo.



## Nia kongreso en Manresa

Post interkonsento de la Manresaj samideanoj kun la Direkta Komitato de K. E. F. estas decidite okazigi nian X<sup>an</sup> Kongreson en printempo de 1923, anstataŭ en aŭtuno de la nuna jaro.

Tio permesos aranĝi pli amplekse la helan feston de la Internaciaj Floraj Ludoj kaj ĝin povos pli facile partopreni samideanoj el malproksimaj landoj. Baldaŭ aperos la alvoko al la literatura konkurso.

Aliaj motivoj ankoraŭ pravigas tian prokraston.



## Franca kongreso en Béziers

Nunjare okazos en Béziers la Franca Kongreso de Esperantistoj, de la 3<sup>a</sup> ĝis la 5<sup>a</sup> de Junio, festo de Pentekosto.

La Sekretariino de la Kongresa Komitato, Fraŭlino Roksano, afable invitis nin ĉeesti tian kongreson kaj eĉ oferis sin por aranĝi, kun la helpo de prof. Roy, en Gaillac, karavanon de katalunaj esperantistoj.

Atentante la proksimecon de Béziers, en la suda Francujo, kaj ankaŭ la fakton ke nia X<sup>a</sup> Kataluna Kongreso en Manresa ne povos okazi la nunan jaron, sed en printempo de la venonta, ni opinias tre oportuna kaj ebla la organizon de tiu karavano.

Sendube niaj samideanoj tre ŝatos ĉeesti alilandan kongreson kaj multnombre ili iros saluti la francan samideanaron, kiu nin akceptos gastame kaj plej kore.

Tiuj, kiuj intencas partopreni, estas petataj jam de nun sciigi nin pri tio.

Ni enmetas en tiu ĉi numero la programon de la Franca Kongreso, kun ĉiuspecaj detaloj.

## ESPERANTAJ GAZETOJ

interŝange ricevitaj de «Kataluna Esperantisto», publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carne, 30, sidejo de K. E. F.

- |  |                                      |
|--|--------------------------------------|
| Egipta Esperantisto, Aleksandrio   | Nova Tempo, Wien                     |
| Le Monde Espérantiste, Paris   | Literaturo, Wolwyn Garden City       |
| Esperanto-Praktiko, Berlin   | Bulgara Esperantisto, Sofia          |
| Belga Esperantisto, Gand   | Ladina Patrujo, Bologna              |
| La Marto, Haida  | The British Esperantist, London      |
| La Semisto, Sabadell   | Nederland-Esperanto, Haag            |
| Germana Esperantisto, Dresden  | La Verda Ombro, Taihoku              |
| Hispana Esperantisto, Madrid   | Amerika Esperantisto, Boston         |
| Katolika Mondo, Graz   | Espero Teozofia, Praha               |
| Espero Katolika, Udenhout  | L'Esperanto, S. Vito al Tagliamento  |
| Kristana Espero, Laihia  | La Revuo Orienta, Tokio              |
| Verda Utopio, Ōsaka  | Arguso, México                       |
| Vegetarano, Haarlem  | Brazila Esperantisto, Rio de Janeiro |
| Esperanta Finnlando, Helsingfors   | Oficiala Gazeto Esperantista, Paris  |
| La Esperantisto, Wien  | Ĉeĥoslovaka Gazeto, Praha            |
| La Laborista Esperantisto, Hannover  | Nova Eŭropo, Praha                   |
| Nova Tagiĝo, Genève  | La XIII <sup>a</sup> , Praha         |
| Hungara Esperantisto, Szeged   | Agitanto, Kronstadt                  |
| Esperanto Triumfonta, Köln   | Bizantio, Konstantinopolo            |
| Bulletin de la Société Française pour<br>la propagation de l' Esperanto, Paris | La Espero, Stockholm                 |
| Internacia Pedagogia Revuo   | Sennacieca Revuo, Paris              |
|  | Esperanto (U. E. A.), Genève         |

Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

## NIA GAZETO ESTAS LA PLEJ LITERATURA

Jen kelkaj el la aperontaj verkoj :

LA KALIKOTA VESTO, Elena Alanic, trad. J. Torrents.

LA DANCANTA PROCESIO DE ECHTERNACH, Renaüd Richez.

LA FESTO DE SANKTA JOHANO, Juli Soler, trad. Marian Solà.

Fragmentoj de la kataluna poemo LA ATLANTIDO, Jacinto Verdager, trad. Josep Grau.

LA SONGÔ DE L' EKZILITINO, Maria Elworthy-Posenaer.

PRI RIMO KAJ RITMO EN LA ESPERANTA VERSFARADO, Artur Domènech.

LA VERO, rusa fabelo (versaĵo), S. Frug, trad. Paul Medem.

NOVA VOJAĜO SENTIMENTALA, ankaŭ nomita LA APOLOGIO DE KATALUNUJO, Agustí Calvet, trad. Jaume Grau.

LA BLUA KORTO, Santiago Rusiñol, trad. Estanislau Pellicer.

Dua ĉapitro de LA TALISMANO, Walter Scott, trad. Marian Solà.

HISTORIA RESUMO DE LA ESPERANTA MOVADO EN KATALUNUJO, D-ro Jacinto Bremón.

LA AMULETOJ KONTRAU LA MALBONA RIGARDO, Ivan H. Krestanoff.

Tradukoj el «KORO», A. de Amicis, trad. Luigi Puppo.

Tria ĉapitro de DON KIĤOTO DE LA MANĈO, Cervantes, trad. Jaume Grau.